FOLKLIVSARKIVET
Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

M.15164: 1.
(översättn. 2 sidor)

Argentina

uppt. år 1952

Svar å LUF 85 rör. hästkött och hästslakt m. m.

s. 1.

M. 15164:1.

**ENKETO DE LA LUND-UNIVERSITATO.-** Argentina

FOLKLIVSARKIVET
Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

En Arg-a Resp-o, en ĉiuj epokoj, la ĉevalviando estis ŝatata kiel bongusta manĝaĵo, kvankam iomete dolĉeca. En la kamparaj bienoj kaj establejoj oni ofte buĉas ĉevalon k uzas la diversajn korpopartojn por malsamaj celoj: la ribaron kaj kelkajn internaĵojn (koro, reno) oni rostas; per krurviando oni preparadas gustoriĉajn kolbasojn. Sed tiu buĉado ne estas oficiala, nur okazas en privataj domoj; la popolo sin nutras per bova aŭ ŝafa viando.

Ekzistas kelkaj establejoj (1 en mia naskiĝurbo, Rafaela) kie oni manipulas la viandon de ĉevalaĉoj kadukaj, senditaj tien de negocistoj el plej malproksimaj lokoj. En tiuj entreprenoj, ĉio el la bruto estas profitata: per kol- k vostharoj oni faras brosojn kaj penikojn; la felo estas vendita al tanejoj, por posta manipulo (tre estimataj estas la botoj el ĉevalida ledo); per plej bonkvalitaj partoj de la lumbo- k krurviando oni preparas iuspecan nutraĵon per artefaritaj sekigado k senakvigado, nomata hispanlingve "tasajo" (1) kiun oni grandskvante ekspedas al provincoj, kie ne abundas la bovviando; per la resto de la viando, t.e. la plejnaŭza, oni faras iun produkton kemie traktatan, tre nutran por la kortobirdoj; kaj fine, per la ostoj pulvorigitaj oni fabrikas bonegan fekundigilon, tre estimatan de la terkulturistoj.

Ekzistas leĝaj punoj por tiuj, kiuj batas, taŭzas, vipas aŭ buĉas kruele kaj senbezone ĉevalojn, kiujn la arg-a popolo amas kiel noblan beston, kiel la nedisigeblan kamaradon de la kampulo. En la landaj tradicioj, aperas la ĉevalo kiel la kunulo ŝatata de la gaŭĉo, kiu trakuradis la vastegajn pampojn (2) kondukante gregojn, kantante, amindumante, kverelante kaj fuĝante el la polico, kaj poste defendis heroe la naskiĝ-grundon kontraŭ la hispanaj entrudulo j, k forpuŝis per lanco k kuraĝo la sovaĝajn marodantajn indianojn ĝis la lastaj limoj de la dezerto, tiel borante luman vojon al la nova civilizo.

La arg-a popolo havas varmajn k noblajn sentojn al la hundoj k katoj, precipe al la bonrasaj, kiujn oni ame flegas en hejmoj k ankaŭ en specialaj societoj.

Tamen ekzistas speciala leĝaro, validanta en ĉiuj urboj. La senmastraj, vagemaj hundoj estas avide persekutataj de brigado da Urbdomaj Oficistoj, kies tasko estas mortpafi senkompate la bestojn, kies mastroj ne pagis iun imposton, kvitancitan per ladeto surnumerita, k alnajlita al la kolrimeno. Antaŭ nelonge tiu kruela kampanjo intensiĝis, obeante registaran dekreton, celantan elimini ĝisradike teruran rabiepidemion, ŝprucinta en kelkaj guberniaj ĉefurboj, kaj viktimiginta multajn personojn, precipe ĉe la infanaro. Do, kiu ajn civitano rajtas mortigi vageman hundon, defende de ĉies sano, sen tio, ke li estas punata aŭ admonata.

La supremencita kampanjo ankaŭ koncernis la katojn, kvankam en malpli terura skalo. La katoj terure multobliĝis kaj jam fariĝis plago k netolerebla ĝeno en urbegoj., kie dum la lasta epidemio multaj el ili enportis la mikrobojn de la rabio.

La taskoj mortigadi la malsanajn hundojn k katojn, inokuli la loĝantaron kaj disvastigi konsilojn k informojn por ĉies singardo, estis entreprenita de la Ŝtata Ministerio por Publika Sano.

xxxxxxx

(1) ~~...~~: TASAJO
(2) Arg-aj ebenaĵoj.

[signature]

VERKIS: s-no. Enio Hugo Garrote
España 445.-
RAFAELA (ARGENTINA RESP-o)

Argentina

M.15164.

(75)

FOLKLIVSARKIVET
Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

I republiken Argentina har under alla tidsperioder hästkött varit ansett som ett välsmakande födoämne fastän något sötaktigt. På bondgårdar slaktar man ofta hästar och använder de olika kroppsdelarna för diverse ändamål: revbenen och några inälvor (hjärta, njure) steker man, köttet å benen använder man för att bereda välsmakande korvar. Men denna slakt är inte officiell, den sker endast i privathus; folket livnär sig medelst ox- eller fårkött.

Det finns några fabriker (1 i min födelsestad Rafaela), där man behandlar köttet av skröpliga hästar, som sänts dit av affärsmän från avlägsna orter. På dessa fabriker utnyttjas allt på djuret: hals- och svanshår användes för tillverkning av borstar och kvastar, hudarna sändes till garverier för vidare beredning, (stövlar av hästläder äro mycket uppskattade) de bästa delarna av länd- och benköttet användes för att bereda ett särskilt födoämne medelst konstgjord torkning och vätskeavdunstning, på spanska benämnt "tasajo", vilket man i stor skala levererar till landskap, som inte har överflöd av oxkött; resten av köttet, d.v.s. det vämjeligaste, användes för tillverkning av en kemiskt behandlad produkt, mycket nyttig för fjäderfä; och slutligen, medelst benstommen tillverkas gödsel, som värdesättes av lantbrukarna.

Det finns lagliga straff för dem, som slår, luggar, piskar eller slaktar på rått sätt och i onödan hästar, som det argentinska folket älskar såsom ett nobelt djur, som en oskiljaktlig kamrat till lantbrukaren. Enligt landets hävd var hästen en omtyckt kollega till gauchos, som löpte genom de vidsträckta slätterna, ledande hjordar, sjungande, flörtande, grälande och flyende från polisen, och senare hjältemodigt försvarande födelseplatsen gentemot de spanska inkräktarna. Gauchos jagade bort med hjälp av lanser och sitt mod de vilda inkräktarna, vilka de förde till ökengränserna, på så sätt beredande en ljus väg för den nya civilisationen.

Det argentinska folket har goda och varma känslor för hundar, och katter, särskilt för de fina raserna, vilka man kärleksfullt vårdar i hem och också i särskilda föreningar.

Det finns likväl särskilda lagar, som gäller i varje stad. De herrelösa, kringströvande hundarna äro glupskt förföljda av stadstjänare, vars uppgift är att hänsynslöst skjuta djur, vars ägare inte betalt någon skatt, som kvitteras genom metallbricka, fäst på djurets halsband. För inte så längesedan blev denna råa kampanj intensifierad enligt ett dekret från regeringen. Härigenom göres ett försök att till roten bekämpa den

M.15164.



FOLKLIVSARKIVET
Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

hemska rabiesepidemi, som har utbrutit i några större städer och hotar många människor, särskilt bland barnen. Alltså får vilken civilperson som helst avliva kringströvande hundar, därigenom försvarande allas hälsa. Något straff för detta finns inte.

Den ovan nämnda kampanjen berör även katter, fastän i mindre skala. Katterna har katastrofalt ökats och har redan blivit landsplåga och ett odrägligt hinder i storstäderna, dit många av dem under denna sista epidemi har burit med sig rabiesbakterier.

Uppgiften att avliva sjuka hundar och katter, ympa befolkningen och sprida upplysningar och maning till försiktighet har företagits av det statliga hälsovårdsministeriet.